

Anteo (Ĉinujo)



rivero

kolektante forton de la tuta vivo,
kuras ĝi al maro,
iam spite al kamaradiĝo kun
makuloj.
aspirante al impeto,
ĝi vagas mil jarojn.
jam ne sangvina,
ĝi kuŝas en la kirlo esperita
sed la membroj kadukas.
vaporiĝa la juneco
lamentas sur la ĉielo.
la spuroj erarvojaj
rearanĝiĝos en venontvivo.

maro

moviĝo aŭ kvieto
dependas de la luno kaj vento.
en la vasteco sen egoo
ĝi toleras ĉion pacience.
la pasia kaŝfluo
falas en abismon.
la ondoj ridaj
estas nur masko dum tago.
la belulino sur la luno kaj la
marvirino
estas monstroj en sonĝoj.
ilia rideto
iĝas min ĝoje krei tri aŭtunojn.



petolante
ĝi trairas ĉarmajn la pejzaĝojn.
florpetaloj al ĝi donas sian sinon kaj
brakumon.
ŝajne ĝi sonĝe vagas.
falfolioj ĵaluzas ja vane.
impetado ne necesas;
ĝi nur deziras la tepidan fondon
daŭri ĝis eterne,
la pejzaĝojn senlimaj
kaj salikoketon akompani ĝin ĉiam.
ordinareco estas feliĉo.
ĝi ne plu ambicias vidi feinojn
sinbanajn.
restante en pajla dometo,
ĝi plukas krizantemojn kaj aprezas
sian ombron ĉe la heĝo.
kia oldulo optimisma!

semoj mistrabaj

naĝante nude en lago sensala,
ĝin spicis mi per ŝvito kaj urino;
prosperas herboj sur fundo ovala.
ricevas ĉirkaŭplekton mi—sardino.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Gasto

Nedezirinda gasto,
kiu nin konfuzas: jen doloro
(abstrakta substantivo)

nur en la vortaro).

Bruego de rompitaĵoj tendenoj
fulmtondras en la ŝultro,
bruligas la kolon,
kaj frostigas la perpleksan brakon:
flugon abortitan, orfon de ĝojo.
Sed la korpo plu vojaĝas.

Juiz de Fora, 19/08/2017.

Konversacio

Poemumi Esperante
estas ravanta magio,
ja facile komprenebla.

La poem' el la montaro
transiras la kontinentojn,
ĉe fremdaj landoj gastiĝas.

Kaj kun la versoj babilas
foraj koroj eksterlandaj:
jen bona akvo trinkebla
en tempo soifoplena.

Juiz de Fora, 22/082017.

Poemeto por Marjorie Boulton



"Ŝajnas ke, dum mi serĉas mian propran
plej realan memon, mi duonkonscie
serĉas ion, kio estos valida por ĉiuj
homoj." (Marjorie Boulton)

Marjorie Boulton: poetin' multobla,
nia plej brila stelo el poezio,
virino homama, nin adiaŭas,
kaj l' esperanta mond' sopiras orfa.

Tamen Parnaso glori al ŝi festas;
gaje dancantaj muzoj ŝin akceptas,
kaj al ŝi regalas per donac' unika:
bunta bukedo da poemoj ŝiaj,
kiuj iĝis vivantaj floroj lumaj.

Juiz de Fora, 31/08/2017.

Paŭlo Silas (Brazilo)



ORIENTTIMORANO

Mi vidis orienttimoranon en buso.
Mi ne scias, kial li venis al Brazilo,
kiom da tempo li estas ĉi tie,
nek ĉu li venis labori aŭ studi.
Mi ne demandis lian nomon.
Mi ne parolis kun li.
Mi vidis lin kiam li jam estis elbusiĝinta.
Mi trovis orienttimoranon en Brazilo.
Kaj tio estas bona.

DU UZITAJ OKULOJ

Mi havas du uzitajn okulojn.
Vi povus diri, ke ne,
ke miaj okuloj estas novaj.
Por konsenti kun vi, mi diros,
ke mi havas du duonnovajn okulojn.
Duonuzitaj ja.
Hieraŭ, kiam mi malfermis libron,
mi rigardis per ĉi du okuloj
kaj falis de la seĝo kie mi sidis.
Mi falis dum dudek ses jaroj ĝis alveni al
putofundo.
Malluma, malseka kaj silenta putofundo.
Kia puno estas memkonscio!
Mi konsciis, ke unu vivo ne sufiĉas
por esplori profunde ĉion registritan en la
multaj miloj da libroj
de la universitata biblioteko,
eĉ ne por leki la pinton de la glacimonto.
Sensencas legado antaŭ tiu panoramo.
La homara sciario humiligas min.
Se mi turnus mian atenton al transcendaĵoj
klarigoj?
Mi povus aĉeti dion kontraŭ bagatela
pago:
iro al templo, legado de esoterismaj
doktrinoj.
Tamen mi preferas la halucinajn konscion

kiu perdigas.
Miaj du uzitaj okuloj ne sukcesos vidi,
legi, kompreni, postvivi ĉion.



Mori (Usono)



AFORISME (24)

Ŝultroj de
idiotoj
estas trono de
despotoj.

Kie neni
estas malriĉa
tie estas la lando
de homo feliĉa.

La plej bona lando
ne estas tie, kie
vivas homo plej riĉa
sed tie, kie neni
estas malriĉa.

Kie oni vivas
laŭ leĝoj de ĝangalo,
la morala nivelo
estas tiel malalta
kiel tiu de animalo.

Kio estas la diferenco
inter putraj terpomoj
kaj tiuj, kiuj indiferencas
pri suferoj de homoj?

Pardono
estas ĉiela donaco
dank' al kiu
ĉiuj vivas en paco.

Kia via edz(in)o
tia via destino.

Antaŭ ol ajnan aferon
ektuŝi,
sciu kion vi intencas
akuŝi.

Kial homoj inteligentaj
kaj saĝaj,
batalas en militoj
kiel bestoj sovaĝaj!?

Kie mankas mizero,
homo vivas kun honor'
kaj libero
tie estas paradizo
sur la tero.

Sen justo,
kaj libero
ne ekzistas
prospero.

Grandecon de l' homo
mezuru ne laŭ mono
nek posteno
nek oro,
sed laŭ la grandeco
de l' koro.

Ho, kiom da bonuloj
sen posteno kaj mono
kaj kiom da etmensuloj
sur la alta posteno!?

La mondon misgvidas
riĉaj idiotoj
kaj stultaj despotoj.

Idiotoj
kreas despotojn
kaj despotoj regas
idiotojn.

La ĉefa kialo de
bataloj inter homaro
estas avaro.

Murdo
ĉiam estas murdo,
ĉu murdo
sur stratoj,
ĉu murdoj de
soldatoj.

En la militoj
kiujn kreas idiotoj
mortas senkulpaj
patriotoj.

Cezar (Germanujo)



Misa kiso

por Anastasia

Iam kisis sukotas'
floran bendon de anas'.
Tia tas' sen cara pas'
blindis pli ol ananas'.

Ekcerbumis la anas'
pri la kis-atak' de l' tas'.
"Kia granda embaras'
pro l' fieco de fatras'!"

VIVU LA VIV'

Vivu la homaro,
sed ne ensupa haro
pro raskonflikta faro.

Vivu pacemuloj
sen la armilpostuloj
de psikopataj uloj.

Vivu grandaj mitoj,
malpli la mitaj ritoj

kaj tute ne militoj!

* *Mi ĵus spontane verkis ĝin, post la legado de [tiu taga poemo](#):*

RUSS WILLIAMS

Dimanĉe ni revenis de vizito
kvartaga en Poznano (jara rito)
kaj lunde legas mi ke Trump kaj Kim plu
insultas kaj minacas pri milito.

Et Liv (Ukrainio)

Splitet' de feliĉo

Al O.

Rompiĝis feliĉo iam
je multaj splitetoj,
kaj vento dispelis ilin
tra l' tuta mondo,
kaj diris saĝuloj oldaj:
se tiu spliteto trafos
la koron de iu viro, -
renkontos li tuj feliĉon,
kaj tio signifas amon.

Kaj unu matenon aŭgustan
enflugis la ĉambron spliteto
kaj koron pikvundis mian.
Renkontis mi tuj ĉarmulinon,
postiris mi ŝin ĉiutage,
rigardis en ŝiajn okulojn,
enamiĝinte pasie.
Mi havis eĉ foje bonsŝancon
brakumi ŝin forte kaj dolĉe,
ebriiĝante pro l' lipoj
kun la bonodor' magnolia.



Sed kovris la sunon nebuloj.
kaj tiu splitet' elkoriĝis
kaj, dolorigante la koron,
rapidis al iu alia,
kaj la ĉarmulin' malaperis,

lasinte en mia memoro
rideton kvietan kaj luman,
ĉar diras la samaj saĝuloj,
ke estas feliĉo tre trompa
kaj longe neniam ĝi daŭras.


Wally Du Temple (Kanado)



Tradicioj de la Amiŝoj

Mi vekigās en urbeto Amiŝa
Centro de farmkulturado varia
Kie kamparanoj arde bienumas
Virinoj kun ŝtrumpoj nigraj, longaj jupoj
Viroj kun barboj maturaj, ŝelkoj elastaj
Resistas kontraŭ influoj modernaj.
Nenia monoagrikulturo monotonas
Kampoj novalas.
Porkoj, bovinoj paŝtas ĉe nekulturata plugter'
Rotacio de rikoltoj kutima afer'
Maizo, milio, luzerno, tritiko
Pennsylvaniaj kampoj jen bunta stebaĵo.
Trarigardante gastejan fenestron
Subite mi aŭdas sonon 'klip klop, klip klope'
De feraj hufŝuoj ritme sonritme 'klip klope'
Antaŭ ol mi vidas kaleŝon nigran, ikone
Amiŝan
Dratradioj kirle kaŝitaj pro radrapidec'
Kaj aĝa presbitero per gvidperfektec'
Bridas sian ĉevalon por halti
Kaleŝon kiel aŭto
En traveturebla memserva vojo
Por depreni
Monbiletojn de pagista maŝino
Per plasta
Debitkarto.

Elena Popova (Bulgario)



GUTOJ DA SANO

En luliloj de folioj
miloj da gutetoj

dormas sorĉitaj
de naturaj sekretoj.
Vekas ilin l' 'aŭroro:
—Tempo estas por laboro!
De malsekaj branĉetoj
alteriĝas rosgutetoj,
kantas kaj petas:
— Venu vi nudpiede,
paŝu kaj al ni kredu —
sanon ni donacas!

Gajo (Ĉinujo)



aŭtuno

kara aŭtuno,
dankon ke vi forpeligis
teruran varmon!

dankon pro viaj
malvarmeta ventblovo
kaj milda pluvo!

dankon pro via
ĉiel' pli alta, blua
kun blanka nuboj!

dankon pro via
lun' pli ronda kaj brila
kun imagigo!

dankon pro ke la
matenaj roseroj sur
herboj brilperlas!

dankon pro ke la
ruĝaj folioj kvazaŭas
printempajn florojn!

dankon pro viaj
orecaj kampoj vastaj
kun rikoltriĉo!

aŭtun' homviva
 estas ankaŭ plej bela
 kun multa ĝojo !

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Ne kredu l' nokton –
 ree ĝi mensogos vin.
 Fajreg' pro dolor'.



Paro promenis
 laŭ la luna vojeto.
 Smeralda tago.



Tablo rompita.
 Nefinlegita libro.
 Anim' vundita.



La teron kovras
 neĝeroj. Frosta maten'.
 La vino brilas.

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKDUA

La ĉielo kaj la tero

§12-02

La Majstro diras: “La Taŭo loĝas en la silenta abismo, klara kaj pura. Sen la Taŭo, la muzikiloj el metalo kaj ŝtono ne sonoras kaj, eĉ se ili eligas sonojn, ili ne sonoras, krom se ili estas ekfrapitaj de la Taŭo. Kiu do povas

determini tiajn kvalitojn de ĉiuj estaĵoj en la mondo? La homo kun reĝeca virto gardas ĉiam sian simplan naturon kaj hontas implikiĝi en mondecaj aferoj. Li radikas en la origina fonto de la Taŭo kaj estas sufiĉe inteligenta por penetri en la landon de mistero. Tial lia virto estas profunda, kaj lia menso estas reagema al la ekstera mondo tiam, kiam ĝi estas stimolita. Sekve, sen la Taŭo la fizika formo estas senviva, kaj sen la virto la vivo ne brile manifestiĝas. Ĉu do tiu, kiu konservas sian fizikan formon, plene disvolvas sian virton kaj evidentigas la grandan Taŭon, ne vere posedas la reĝan virton? Granda kaj impona, li subite aperas kaj rapide moviĝas sekvate de la estaĵoj de la mondo. Tia ja estas la homo kun la reĝeca virto!

La Taŭo aspektas mallume kaj profunde kaj sonas silente kaj trankvile. Kaj tamen li povas sola vidi la lumon en la mallumo kaj aŭdi la harmonion en la silento. Tial en la plej profunda profundo estiĝas la estaĵoj; en la plej mistera mistero ekzistas la esenco. En sia rilato kun la estaĵoj en la mondo la Taŭo, kvankam malplena, kontentigas ĉiajn bezonojn iliajn; kvankam rapide moviĝanta, ĝi estas la loĝejo de ĉiuj estaĵoj, grandaj kaj malgrandaj, longaj kaj mallongaj, proksimaj kaj malproksimaj.”

§12-03

Dum sia vojaĝo al la nordo de la Ruĝa Rivero, la Frava Imperiestro supreniris sur la montaron Kunlun kaj rigardis suden. Reveninte li trovis, ke lia nigre brila perlo (la Taŭo) perdiĝis. Inteligento estis sendita por ĝin serĉi, sed li ĝin ne trovis. Akravido estis sendita por ĝin serĉi, sed li ne sukcesis. Elokvento estis sendita por la samo, sed ankaŭ li ne sukcesis. Finfine la Stulto estis sendita por tio, kaj li ĝin trovis. La Flava Imperiestro diris: “Kiel strange estas, ke eĉ Stulto povis ĝin trovi!”

§12-04

La instruisto de la reĝo Yao estis Xu You;

la instruisto de Xu You estis Nie Que; la instruisto de Ye Que estis Wang Yi; la instruisto de Wang Yi estis Bei Yi.

La reĝo Yao demandis Xu You, dirante:

“Ĉu Ye Que povas esti la reĝo? Mi petos Wang Ni, ke tiu invitu lin.”

“Tio estos danĝera por la regno!” diris Xu You. “Kiel homo, Ye Que estas inteligenta kaj sagaca. Liaj talentoj multe superas tiujn de aliaj, kaj li scias interpreti la naturon pere de homaj penoj. Li estas lerta en evitado de eraroj, sed li ne scias iliajn kaŭzojn. Se oni konfidus al li la regadon, li sin turnos al la homa inĝenierco kaj neglektos la naturon. Li rilatigos ĉion al sia mem en la traktado de ĉiuj aferoj; li adoras la sciojn kaj kursekvas ilin; li estos pelata de la aferoj kaj dronos en ili; li estos sklavo de la cirkonstancoj kaj de la aferoj; li submetiĝos al ĉiuj influoj kaj havos nenian fiksan ideon. Kiel do li povos esti taŭga por fariĝi la reĝo? Li povos esti ministro, sed li ne povos esti la reĝo. Lia regado estos la kaŭzo de malordo — katastrofo por la ministroj kaj ruinigo por la regno.”

elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Ankaŭ vi estas lupoj

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Nobelo

ŝafon savis el

la buŝo de lupoj kaj

ĝi sekvis lin kun fidel'
al hejm' de l' nobel'.

Li hejmen

iris fiera.

Li preparis buĉi ĝin

per tranĉilo ŝtalfera

per man' kruela.

La ŝafo

pro lia perfort'

blekadis ja senĉese

en lia malgranda kort'

evite de mort'.

La krio

Afanti-n vere

surprizis, kiu loĝis

najbare, netolere

iris kolere

al la kort'.

Klare la nobel'

diris: “Mi ĝin el lupoj

savis pro ĝia mizer'

sub brutala pel'.”

Afanti

jen serioze

ĉuis: “Kial ne dankas

ĝi, sed blekas riproĉe

kaj tre nervoze?”

Riproĉas

ĝi mizere sub

via mortiga pozo.

Vi agas kun peza kulp',

vi ja estas lup'!”

Frenezulo

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti

post longa resto
en urbo pro afero
reiris al hejm-nesto
por ripoz-festo.

Survoje
en arbaron li
misis kaj jen vidis
nobelon ĉasanta ĉi
kun granda pasi'.

Retenis
lin tiu krie
ĉuis: "De kie venas
vi?" dirante defie,
senemocie.

Afanti
respondis klare:
"De tiu urb' nefora,"
montrante senerare
al l' urb' trans-vale,

kiu ja
estas la hejmlok'
de l' nobelo kun luksa
kastel' sur fortika rok'
kun granda allog'.



La nobel'
jen demandis plu:
"Kia la urbo estas?"
"Bela kun bona situ'
kaj kun viva ĝu'!"

"Nun diru:
kiel la riĉaj
homoj kondutas tie."

"Ĉiuj mon-superstiĉaj
kaj perfortiĝaj."

"Kiel pri
la mandareno?"
"Li estas tre tirana
kiel stulta azeno
kun kruelpeno."

Ĉe tio
ĉuis la nobel':
"Ĉu vi vere konas min?"
Afanti respondis: "Ne,
ne, ne, neniel."

"Mi estas
tiu mandaren'."

Do, Afanti demandis:
"Respektinda moŝto, jen,
ĉu konas vi mem


min vere?"
"Ne, mi asertas!"
"Tiea frenezulo
mi tute esti certas
kaj mi avertas,

ke kvankam
mia frenezo
ne ĉiam min atakas,
mi agas laŭ herezo
ja sen komplezo."

Afanti
aldonis plue:
"Mi ja benas vin sane
kaj malsane mi brue
diraĉas ĝue!"

Hodiaŭ
en malsan-stato
mi tamen diris al vi
la veraĵon laŭ ŝato
sed ne la flaton!"

Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭtuno

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Aŭtuna
posttagmeza hor’
Malheliĝas ĉielo.
Pro fulmo timiĝas kor’.
Birdoj flugis for.

.
Aŭtuna
ŝtormeto kurtas.
Trompas nin aĉa veter’
Homoj sin varme vestas
kaj fi-lamentas..

Videblas
pluvofloketoj.
Ĉielo kvietiĝis
Jen, kuras du hundetoj
laŭ stratvojetoj.

Krepusko
iĝas viola.
Post suna aperado
eĉ tero iĝas mola.
Nur vi, ve, sola.

Oriĝas
ŝprucofontano .
Sunsubiro nestis sur
la pinto de kaŝtano.
Sur ŝtupo pano.

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Yanke (Ĉinujo)

Por

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Por

unu rev’ mi kun fervor’
iradas
ĝis la cel’ en for’.

Mi,
spite ĉion kun defi’,
esperas
bonon de premi’.

Sed
antaŭ malica obsed’
anhelas
mi, tamen sen ced’.

Sent’
tima en ajna moment’
ne kaptu
min per pen-turment’.

Ĝoj’
min akompanas sur voj’
sinua
al monta orgojl’.

*Dekses-Silabo: ĉina fiksforna poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Guram Svanidze

Ĉu estis lito?

(reala historio)

Kiam mi lernis en Moskvo, mi kromlaboris kiel gardisto. Mi eĉ faris karieron, oni promociis min al ofico de brigadestro. Mia samregionano-samkursano evitis tian laboron. Sed li regule petegis monon de gepatroj. Mi memoras, kiel li kriegis al aŭskultilo de interurba telefono, kiu pendis en vestiblo de studenthejmo: “Kiam mi revenos hejmen, mi kripligos ĉiujn, forbruligos domon!” Li urĝe bezonis mil rublojn por aĉeti ĵinson. En alia ekstremaĵo de drato oni ne komprenis, por kio li tiom bezonas. Pro tio sekvis argumento kun tre esprimplena leksiko:

– Ĉu vi ne konsideras restoraciajn kostojn,

vesperfestojn, knabinojn?! (kaj plu sekvis insultaĵoj pro stulteco de gepatroj).

– Kial li krias? – demandis min rusa junulo, kiu staris en vico al telefono kaj ne sciis kartvelan lingvon.

– Verŝajne estas malbona komunikiĝo, – mi respondis.

Mi havis ankoraŭ unu enspezon. Mi skribis por petantoj, plendantoj kaj la aliaj. Multaj homoj alveturis en Moskvon por justeco. Mi tajpis diversajn deklarojn per tajpilo kaj ankaŭ konsilis. Mi eĉ havis takson – por letero al partiaj aŭ administraj organoj je 5 rubloj, al ministerioj je 3 rubloj. Tiu laboro estis teda, sed unu okazo amuzis min...

Tiam okazis 27-a kongreso de Komunista Partio de Soveta Unio. Samregionanoj alkondukis unu petanton, ke mi helpu lin kun letero al la kongreso. Teksto (proksimume 15 paĝoj) estis en kartvela lingvo, oni petis traduki. La teksto komenciĝis de tio, ke petanton de tiu deklaro, Pantiko A., oni akuzis pro malmorala konduto, kaj pro tio oni eksigis lin el partio. Li volas, ke oni reoficigu lin.

Okazis tio...

Iam, kiam la petanto forestis en hejmo, lian domon vizitis kuzino kaj ŝia amikino. Nomo de la amikino estis Lamzira, la junulino el vilaĝo. Edzino de Pantiko, Dariko, akceptis la gastojn. Tio estas ordinara okazo, sed poste sekvis malagrablaj rezultoj. Post ioma tempo post la vizito okazis, ke Lamzira estas graveda. Patro de la junulino aranĝis esplordemandadon, sed ŝi ne povis rememori, de kie estas “tio”. “Kiaj interparoloj estos en la vilaĝo?” – la patro afliktiĝis. Komence oni suspektis ĉefon de Lamzira. Ŝi kune kun la kuzino de Pantiko laboris en urbo en vendejo. Oni eldiris al li pretendojn, sed li batis senditojn kaj post ili pafis per fusilo.

En unu tago al Lamzira subite venis ideo. Kaj jen ŝi je 3-a monato de gravedo venis al Pantiko. Li en tiu momento hakis hejtlignaĵojn

en korto. Li ekvidis ŝin, ŝia vizaĝo estas humila kaj multsignifa, ventro jam estas videbla. La mastro, simpla viro, subite demandis, ĉu la gastino estas graveda. Sekvis respondo:

– Jes! Tial mi venis. Mi portas vian infanon...

Pantiko pro neatendeco faligis hakilon. Lamzira rapide babilis:

– Jes, vi forestis en hejmo, kiam mi kaj via kuzino venis ĉi tien. Afero estas en tio, ke mi... sidis sur via lito. Post tio mi sentis, ke mi iĝis graveda.

– Mi ĉagreniĝas pro senskrupuleco de mia lito! – li diris mokeme rigardante ne belan Lamzira. – Ĉu vi sen pantaloneto iras gastari al ne konataj homoj?

– Vere, vi demandas maldecajn demandojn al la sinjorino, – estis respondo.

Dum Pantiko elpensis vican ŝercon, en tiu momento kiel neofronoj alflugis parencoj de Lamzira. Iuj venis “kun kukaĵo”, la aliaj venis “kun vipo”. Li ne povis defendi sin. Li prenis monon, kaj iĝis ĉe li du edzinoj: la nova, tio estas Lamzira, kaj la malnova, Dariko. “La nova” promesis forveturi al la vilaĝo, kiam infano naskiĝos. Dariko ankaŭ decidis elteni.



Ilustraĵo de Igorj Ĥomjakov

– Mi revenos en la vilaĝo, kvazaŭ mi ne amikiĝi je edzo. Najbaroj trankviliĝos, ne suferos pro konjektoj, – Lamzira parolis al la

ne tro saĝa poligamiulo. – Ja mi ne povas klarigi al ĉiuj, ke mi gravediĝis pro via lito.

Naskiĝis knabo. “Perlaboritan” monon Pantiko elspezis riparon de tegmento. Sed Lamzira ne volis foriri. Dum vica skandalo ŝi riproĉis la gemastrojn, ke ili riparigis tegmenton kaj nun ne bezonas ŝin. Bonokaze la petanto ne havis siajn infanojn. Konekse al tio dum sekva kverelo Lamzira diris:

– Dariko ne povas naski. Tial mia filo ricevos tutan mastrumon.

La mastrumo estis ne malgranda: aŭto “Volga”, duetaĝa domo kun korto. Kiam gemastroj elpelis per batoj la junulinon, ŝi laŭte kriis, por ke najbaroj povu aŭdi:

– Mi mortigos min! Mia filo iĝos orfo! Mi skribos plendon al regiona komitato!

Najbaroj aŭdis ĉion kaj antaŭĝuis. Ili atendis pluajn eventojn. Lamzira realigis sian minacon – ŝi skribis leteron al regiona komitato, ke Pantiko malvirtigis ŝin. Bonokaze ŝi ne menciis la liton. Certe ŝi ne mortigis sin.

Tiun aferon oni ekzamenis en partia komisiono. La kompatindulo sidis en vestiblo kaj kun li stumblintaj sekretarioj de regionaj komitatoj. Ili tremas, estas palaj. Oni elvokis unuope en kabineton. Multajn homojn oni elportis sur portilo el tiu terura kabineto. Venis vico de Pantiko, tie oni akceptis lin sufiĉe gaje.

– Mi ankaŭ pensis kiel Lamzira, ke mi ne mencias la liton, sed komisiono komencis klarigi kaj klarigis tiun cirkonstancon.

– Vi estas stultulo, sed ne malĉastulo, – diris al li unu severa viro. – Tiaj homoj ne devas esti en partio.

– Kaj nun mi estas ĉi tie en Moskvo. Mi esperas nur al vi! – Pantiko diris al mi, kiam mi finlegis lian deklaron. Ke deklaro estu ne rida, ni decidis ne menci la liton. La deklaro iĝis mallonga, sed “anima” – “oni disigis kun amata partio!”

Kiam la kliento kvitiĝis, mi demandis lin,

kio estis fakte. Li nemulte hezitis kaj diris, ke li prenis al si aliulan pekon kaj pro tio perlaboris monon.

– Sed la virinaĉo okazis impertinenta! – li rezumis.

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov

(Rusio)

Bakin (1904-2005)



La paradizo por birdoj

Ni vespermanĝis ĉe la lernejo, kie nia amiko instruis. La vetera varmego jam mildiĝis. La suno subiris la monton kaj restigis rubandon da vesperruĝo sur la ĉielo, sur montsupro kaj sur arbokronoj.

“Ni iru remi,” Chen proponis. Tiam ni spektis la montan pejzaĝon, starante ĉe la lageto antaŭ la lerneja pordo.

“Bone,” aliaj amikoj ĝoje eĥis.

Irinte pecon da makadamita vojo, ni rapide atingis la riverbordon. Tie staris domo kun palafitoj en riverakvo. Trairinte ĝin, ni trovis kelkajn boatojn sub du arbegoj ĉe la bordo.

Ni saltis en boaton unu post alia. Unu amiko malligis la ŝnuron de la boato kaj movis ĝin per bambustango. Ĝi malrapide skuiĝis kaj glitis al la mezo de la rivero.

Tri amikoj remis. Mi kaj Ye spektis la pejzaĝon ĉirkaŭan, sidante en la boato.

Malproksime sur montdekflanko alte staris pagodo en brakumo de multaj verdaj arboj. En la proksimeco mankis multe da tiaj pagodoj, kaj tie troviĝis la hejmloko de amiko Ye.

La rivero estis larĝa, sed neniam ondetoj videblis sur la blanka akvosurfaco. La boato trankvile fluis sur la rivero. Tri pagajoj regule plaŭdis en akvon.

Ĉe iu loko la rivero mallarĝiĝis. Frondoj post frondoj kun verdaj folioj sin ŝovis sur la riversurfaco. Tiuj folioj estis aminde verdaj. Ili apartenis al prospere kreskantaj banjanarboj, sed mi ne povis vidi

